# *Rusio kaj ?inio fabrikos pli ol cent milionojn da vakcinoj Sputnik V*



Moskvo/Pekino, apr 19 (RHK) La fonduso rusa de rekta investo (RDIF) sciigis ?i-lunde, ke ?i interkonsentis kun la farmacia kompanio ?ina Hualan Biological Bacterin Inc. la produktadon de pli ol 100 milionoj da dozoj de la vakcino Sputnik V kontra? la kronviruso en la azia lando.

La rusaj a?toritatuloj klarigis ke per tiu nombro da dozoj oni povus vakcini pli ol 50 milionojn da personoj, kaj aldonis ke la RDIF kaj Hualan Biological Bacterin “sin devigis subteni kunlaboron je longa tempolimo por la produktado de la vakcino”.

“La interkonsento de kunlaboro kun Hualan, unu el la ?efaj fabrikantoj de vakcinoj de ?inio,helpos signife kreskigi la produkto-kapacitojn de Sputnik V”, asertis la direktoro de RDIF, Kirill Dmitriev.

“?inio estas unu el la partnetroj kernaj en la produktado de la rusa vakcino, uzata praktite en la tuta mondo por protekti la sanon de la homoj, tial ke Sputnik V demonstris sian sekurecon kaj altan efikecon”, li aldonis.

Fonto: RT

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/254587-rusio-kaj-cinio-fabrikos-pli-ol-cent-milionojn-da-vakcinoj-sputnik-v

**Radio Habana Cuba**